

BRAZILA ESPERANTISTO

49-A JARO

MAJO-JUNIO 1955

N.º 494-495

RIO DE JANEIRO



PLACO PARIS

Belega ĝardene ornamita apudmara placo. En ĝia plilongigo sur la maron situas la grandioza placo ĵus konstruita de la Urbeŝtraro, kie okazos la 36-a Internacia Eŭkaristia Kongreso. Proksime de la Kongresa Placo staras la aerodromo Santos Dumont.

MAJO-JUNIO 1955

N. 494-495

49-a Jaro

BRAZILA ESPERANTISTO

«O Esperantista Brasileiro»

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 1.º

Telefona: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Senpaga por anoj de B. E. I.

Eksterlande: unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

	Cr\$
Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o «Brazila Esperantisto»	40,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	70,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista «Esperanto»	150,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	250,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante	750,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante	3.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º**

Rio de Janeiro, DF.

MEMBROS DE UEA

A estatística publicada no número de Março último do *Esperanto* mostra que em 1954 se inscreveram na Universala Esperanto-Asocio membros de 80 países.

Os países que fizeram mais de 1.000 inscrições foram os 7 seguintes:

Brasil	2.579
Suécia	1.847
Grã-Bretanha	1.585
Itália	1.321
Dinamarca	1.200
Holanda	1.174
França	1.064

Para o total de 17.001 o nosso país contribuiu, pois, com mais de 15%. Além disso, dos 741 Membroj-

Subtenantoj 72, ou quase 10%, foram do Brasil.

Samideano brasileiro, se você está satisfeito com a nossa posição, ajude-nos a mantê-la.

Se pensa conosco que é preciso e possível melhorá-la, então colabore vigorosamente para essa melhora !

PRÓXIMAS EDIÇÕES DE B. E. L.

O Protocolo — Machado de Assis —
 Prefácio do Académico J. Paulo de Medeiros — Tr. de Manuel Aveleza de Sousa

Dicionário de Bolso Esperanto-Português — Couto Fernandes — 5.^a ed. do Esperanta Radikaro kun portugala traduko

Dicionário de Bolso Português-Esperanto — Carlos Domingues Ak.

B R A Z I L A E S P E R A N T I S T O

49-A JARO

MAJO-JUNIO 1955

N.º 494-495

LIÇÕES DE UMA VITÓRIA

A esplêndida vitória que alcançamos em Montevidéu para o Esperanto e para o movimento esperantista, não foi um fácil triunfo, conforme já tivemos ocasião de acentuar em artigo anterior. Ela resultou de um metódico e demorado trabalho, que culminou com a batalha final na VIII Conferência Geral da UNESCO, na qual foi ainda preciso defrontar sérios obstáculos.

Na persistente acção desenvolvida cumpre mencionar a colecta de assinaturas para a petição-monstro, apresentada à ONU. De todas as partes do mundo movimentaram-se os esperantistas para conseguir adesões que permitiram elevar a cerca de dezessete milhões o número total de declarantes. Foi este talvez o maior documento dessa natureza que o mundo já conheceu.

Quando a ONU encaminhou à UNESCO a petição, a Universala Esperanto-Asocio, com a cooperação das ligas nacionais filiadas, empenhou-se em vigoroso esforço, que se fez sentir já na VII Conferência Geral da UNESCO em Paris.

A seguir as ligas nacionais assumiram importante papel, procedendo junto aos Governos dos Estados-Membros, esclarecendo-os a respeito da

questão e pleiteando o apoio de cada um deles.

Era indispensável que o Esperanto se fizesse representar na Conferência de Montevidéu. Sabe-se, porém, que os movimentos idealistas, como o nosso, em regra, não têm abundância de recursos. Constituiu-se, então, um fundo especial, que felizmente contou com a contribuição generosa de bom número de samideanos.

Para a I Exposição Universal de Esperanto houve também dedicada coadjuvação não só de material vindo de muitos países como do admirável labor dos esperantistas uruguaios, que tiveram a seu cargo a organização da brilhante mostra. Essa exposição alcançou incomparável eficácia, e para nós, esperantistas, foi igualmente uma comovente oportunidade de recordarmos os feitos meritórios dos batalhadores que passaram mas que se achavam presentes em obras que asseguraram, através dos anos, o êxito da obra inicial de Zamenhof.

Por fim, a escolha do homem mais indicado para cumprir a árdua missão, e realmente o Prof. Lapenna, nosso representante, excedeu a mais optimista expectativa pela maneira por que, advogado exímio, defendeu a causa da Língua Internacional.

CECIL CHARLES GOLDSMITH

Nia tre estimata samideano S-ro Cecil Charles Goldsmith emeritiĝis en Novembro de la lasta jaro kaj tial lasis la oficon de Ĝenerala Sekretario de UEA, kiun li plenumis kun rimarkinda kompetenteco kaj nekomparebla sindono dum preskaŭ 20 jaroj.

En tiu longa periodo ni tenis plej amikan kontakton kun la granda batalanto por nia afero; kaj por nia laboro ni sendube multon lernis el lia akurateco kaj korekteco.

La tuta Estraro de BEL sendis al tiu kara amiko la leteron kun saluto kaj danko, kiun nia gazeto plezure publikigas:

Rio de Janeiro, la 3-an de Marto 1955.

S-ro Cecil Charles Goldsmith,
Londono.

Estimata sinjoro kaj samideano,

Eksciinte pri via emeritiĝo post preskaŭ dudek jaroj da laborado ĉe U.E.A., kiel ĝia Ĝenerala Sekretario, ni, viaj brazilaj samideanoj kaj amikoj, esprimas al vi nian laŭdon pro

Altas lições se tiram, sem dúvida, dessa jornada bem sucedida, mas duas parecem sobrelevar a todas: a de que devemos proceder com disciplina e coesão e a de que é necessário empregar os meios adequados.

Usar com inteligência as nossas energias, não as desperdiçar a esmo, eis a bela regra de conduta, que nos deve inspirar sempre, como inspirou para o bom resultado perante a UNESCO nesta fase dos nossos esforços.

C. D.

viaj alte meritaj servoj al nia afero kaj samtempe nian bedaŭron pro via foriĝo el la centra domo de la Esperanto-movado.

Tio ne signifas, ke vi defalis de niaj vicoj; nun, en la ombro de ripozo vi juste ĝuas rajton el plej bone elplenumita laboro, kaj via tuta agado estas plue, kiel ĉiam, modelo por ĉiu, kiu sincere deziras tenadi vivanta la verkon de nia kara majstro.

Bonvolu do, estimata samideano, akcepti niajn manojn por elkora premo kaj la certecon pri niaj plej amikaj sentoj por tiel kunbatalanto.

Carlos Domingues, Prezidanto —
Ismael Gomes Braga, Viceprezidanto —
Porto Carreiro Neto, Ĝener. Sekr. —
Mario Ritter Nunes, Unua Sekret. —
F.F. da Costa Filho, Dua Sekret. —
Irani Baggi de Araújo, Kasistino.

NASKIGO

Nia samideano *Geraldo Mattos* komunikis al ni la naskiĝon, la 20-an de Februaro, de sia unua infano, kies nomo, honore al nia majstro, estas *Ludoviko*.

NOVAS EDIÇÕES STAFETO

Cr\$

El la maniko — *Novelaro* —


Reto Rossetti 100,00

Koko krias jam — *Originala novelaro* — *Ferenz Szilágyi* 100,00

Serviço de Livros de B.E.L.

H. C. ANDERSEN

La ĉi-suban artikolon sendis al ni Lia Ministra Moŝto de Danujo en Brazilo, okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de la dana mondfama verkisto H. C. Andersen, kies fabeloj estas tradukitaj Esperanten de D-ro L. Zamenhof kaj aliaj esperantistoj.



Antaŭ 150 jaroj, la 2-an de Aprilo 1805, naskiĝis Hans Christian Andersen en la malgranda urbo Odense en Danujo, en plej malriĉa medio, sub ŝajne plej malbonaj kondiĉoj por feliĉa estonteco, kaj tamen li fariĝis la plej fama filo de sia lando, unu el la plej grandaj fabelverkistoj de la mondo. En sia maljuneco li vidis sian nomon flanke de la nomoj de Homer, Dante, Cervantes, Shakespeare, Goethe. Estis — kiel li mem sentis kaj esprimis tion — fabelo en la realeco, realeco pli miriga ol la elpensajoj de la fantazio.

Kiel tio okazis? Ĉu ni povas doni klarigon aŭ ĉu ni nur diru: genio! kaj meditu pri la enigmoj de la estado? Ni respondu, ke ni povas kompreni almenaŭ *iom* de la enigmo. Enigmoj ordinare estas klarigataj per malofta kaj stranga kombino de cirkonstancoj kaj hazardoj, mozaikenigmo de la sorto. Ni ankaŭ simple povas

nomi tion "bonŝanco". Ni bone vidas, ke la hazardo kaj la "bonŝanco" estis netakseblaj helpoj por la energio kaj preskaŭ neŝanceligebla memfido de Hans Christian — "kuraĝulo ĉion atingas", diras dana proverbo — kaj ni ankaŭ povas diveni, ke se la bonŝanco nur en unu punkto ne helpus al li, tiam nun ne estus ekzistanta ia H.C. Andersen. Fakte la malfacilaĵoj kelkfoje estis tiom fortaj, ke li preskaŭ perdis la esperon. Oni rajtas kredi, ke multaj grandaj talentoj en la mondo pereis aŭ malaperis en la forgeson de la historio, ĉar "la bonŝanco" forestis, ĉar la cirkonstancoj ne estis favoraj al la talenta infano, ĉar tio simple ne estis ebla. Ĉiuj parencoj, gekonantoj kaj protektantoj de la eta Hans Christian insiste malrekendis al li strebi al la altaj celoj, kaj ili havis ĉian prudenton kaj antaŭsenton je sia flanko. Liaj planoj estis tiom fantaziaj, ĝis preskaŭ la limo de mensa malsaneco, sed samtempe li estis tiom simpatia kaj naive kortuŝanta, ke oni sentis helpemon kaj bonecon al li. Unu el la kaŭzoj de la sukceso de Hans Christian estis la speciale amik-patriarkala karaktero de la ŝtatoficistoj en la eta absoluta monarĥio de Frederiko la sesa. Kompreneble H.C. Andersen estis speciale talenta infano de sia naskiĝo, ekipita per abnorma sentemo (freneteco estis en la patra familio) kaj tre viva fantazio. Li havis la sorton esti sola infano, kaj la feliĉon esti sola infano en bona amika hejmo, kie la gepatroj amis unu la alian, kaj amis la knabon. Li kreskis en kvieto, kiel trankvila introspekta infano, kiu ludis kun si mem, en la mondo de la fantazio, kun bildoj kaj historioj kaj pupoj kaj teatro. Li estis karakterize kreanta, produktiva infano, kaj male de aliaj malriĉaj infanoj li povis sekvi sian naturon, povis esti kiel li volis, jes, li tute simple dorlotiĝis, anstataŭ esti ŝarĝata per laboroj kaj devoj, por kio certe estus sufiĉe

da kaŭzo en la malriĉa hejmo. La patro estis "liber-ŝuisto", tio estas, ŝuisto ekster la korporacio, sed memstara, pensema kaj kritikema animo, kiu sentis sin destinita por io pli alta ol ŝuisto; li kapablis voĉlegi la fabelojn de 1001 noktoj kaj la komediojn de Holberg (dana komediverkisto) antaŭ sia filo. La patrino estis multe pli aĝa kaj naskis infanon antaŭ la geedziĝo. Post la morto de la patro en 1816 la malriĉeco fariĝis premanta, iom post iom fakte mizera (la patrino sin vivtenis kiel lavistino kaj poste fariĝis drinkema), sed Hans Christian daŭre vivis en sia mondo de revoj kaj ludo.

La proleta medio donis al la estonta fabelverkisto du grandajn aktivojn, du specojn da spertoj, kiuj ne estis je dispono por liaj samaĝaj talentuloj de pli altaj ŝtupoj en la socio. La unua estis la proleta sfero en kiu li kreskis, primitiva aŭ nur antikva mondo plena je restaĵoj de popolkredo, popollegendoj, magio kaj idoleco, precipe dia patrino estis tre superstiĉa, kaj detaloj en la kredo pri magio de la objektoj sidis en li mem. Tio signifis grandan fortigon kaj nutraron por lia fantazio. La alia flanko de la proleta medio male fortigis lian realsenton, lian realan senton pri postuloj de la vivo. Kiel proleto li vidis la socion de malsupre: mizero kaj ĉifonuloj, drinkemo kaj prostitucio, homruino en la malliberejo aŭ en la frenezulejo en Odense. Li vizitis multajn hejmojn, ĉar li estis interesa infano, kiu povis rakonti historiojn kaj kanti memfaritajn kantojn.

La travivaĵo, en la teatro de Odense, vidis reĝan teatran prezentadon estis decidiga por lia estonteco: li deziris fariĝi dancisto aŭ kantisto ĉe la teatro. Kaj kontraŭ ĉies konsiloj kaj avertoj la 14-jara longa kaj strangaspekta knabo iris al Kopenhago por serĉi bonŝancon kun 10 taleroj (malnova monero dana) en la poŝo, kaj krom tio nur kun sia forta memfido kaj kredo je la boneco de la sorto. Kompreneble li malsukcesis, la direktantoj de la reĝa teatro lin malakceptis, same faris la dancistino, kiun li vizitis kaj konsternigis dancante en ŝia ĉambro soldancon. Sed tamen la bonŝanco kaj liaj strangaj ecoj havigis al li protektantojn inter kope-

nhagaj artistoj, tiel ke li ricevis monon por iom lertigi sin.

Li vivis tre malbone en la ĉefurbo dum tri jaroj, poste eĉ pli mizere kaj finfine sur la rando de la senespero. Kiel statisto en la reĝa teatro li ensorbis la ravan atmosferon de la teatro, kaj li komencis verki teatraĵojn. Nun li devus fariĝi poeto, ĉar lia bela kantvoĉo malaperis kaj lia aspekto faris lin maltaŭga kiel artiston. Du dramojn li verkis, laŭ la plej bonaj modeloj de la tempo. Senhelpaj kaj neintence komikaj ili estis, sed ili fariĝis lia savo. La teatra direkcio trovis ilin promesantaj kaj la plej granda protektanto de H.C. Andersen, la financdeputito Jonas Collin, unu el la plej potencaj viroj de la ŝtato, helpis lin — en la plej granda mizero — kaj metis lin helpe de la reĝo en la latinlernejon de Slagelse.

Artiumo — studenta ekzameno — tiam estis necesa akceptilo al la parnaso, kaj la pli altaj kultur-rondoj. Sen klasika edukado la proleta knabo de Odense neniam estus pli ol mizera originalo. Estis por li granda provo, terura tempo. Jen du kontraŭaj fortoj karambolis, kvazaŭ fajro kaj akvo: senpera, impulsema, kreanta kaj improvizanta naturo devis porti la ĉenojn de ordemo, diligenteco, disciplino, precizeco kaj ekzameno laŭ la malnova lerneja formo. La rektoro de la lernejo fariĝis pli kaj pli ekscitita pri li, fine rekte malamika kaj moke ironia. Kiel neniam antaŭe aŭ pli poste H.C. Andersen ĉi tie estis "la malbela anasido". Li suferis, plendis kaj humiliĝis, en sia mizero preta rezigni pri ĉiuj revoj, sed denove li saviĝis, forprenita de la lernejo (la adiaŭaj vortoj de la rektoro estis: "Iru al la infero!") kaj preparata por ekzameno per privata instruado. Li trapasis la lernejan purigadon, konservante sian artistan naturon, sed tio estis por li multekosta: la daŭra timo kaj humiliĝo de ĉi tiuj lernejoj estas la ĉefaj kaŭzoj de lia neŭrotika karaktero dum la resto de la vivo, de lia malplivalora sento kaj de la — de tio devenanta — abnorma sentemo antaŭ kritiko kaj abnorma bezono por laŭdoj kaj gloroj, kaj lia fama kaj senlima vanteco.

Post la ekzameno en 1828 H.C. Andersen daŭrigis la studadon ankoraŭ unu

jaron, sed tiam ĉesis kaj povis de tiam vivteni sin per sia plumo. Li nun estis akceptita en la literaturaj rondoj. Kopenhago tiam estis, en la tempo 1825-50, la centro de malofta spirita evoluo, tre nekutima intereso pri filozofio, literaturo kaj arto, eble speco de rekompenco por la politika neaktiveco dum la absolutismo. Etika klereco estis la celo de tiu tempo kaj la reĝa teatro estis la centro de la vivo. Tiun tempon oni nomas "la dana orepoko" kaj tiam vivis la poetoj Oehlenschlaeger kaj Grundtvig, la skulptisto Thorvaldsenm, la sciencisto C. Orsted kaj la filozofo Soren Kierkegaard, krom multaj aliaj eminentaj personoj, kies nomoj ne estas konataj ekster la limoj de Danujo. Estis fruktedona tempo, sed ankaŭ eta mondo, kie oni tro bone konis unu la alian, kaj kie kritiko, ironio kaj ĉikano bone floris. Antaŭ tiu ĉi delikata, preskaŭ superkulturita atmosfero estis por H.C. Andersen bona lernejo. Jen oni postulis ne nur personecon kaj ideriĉecon, sed en eĉ pli alta grado la formalan virtuozecon, la elegantecon, la spritecon kaj la akran plumon kiel defendilojn. H.C. Andersen estis kutima gasto ĉe multaj el la altrangaj familioj de la urbo kaj ĉe signifaj poetoj kaj artistoj. Lia spirito abunde nutriĝis. Grandan influon al lia viv-kaj artpercepto havis la amikeco kun H.C. Orsted. Kaj en la multnombraj situacioj, kie li daŭre sentis la protektantan ŝajnfablecon, malrespekton aŭ sentis la venensagojn de la kritiko, li lernis uzadon de siaj talentoj por humoro kaj ironio. Li vere hardiĝis kaj aklimatiĝis al la diversaj rondoj. Liaj denaskaj kapabloj, lia kreskado en la proleta medio, liaj konfuzaj kaj turmentaj studjaroj en la teatro kaj en la latinlernejo, kaj lia literatura klerigo en la plej altaj rondoj de la ĉefurbo — jen la kondiĉoj por lia verkado. Lia aŭtoreco jam komenciĝis en la jaro 1822, tuj antaŭ lia restado en la lernejo en Slagelse, per eta kajero "Junecaj klopodoj" sub pseŭdonimo William Christian Walter (William laŭ Shakespeare, kaj Walter laŭ Walter Scott!). Per freŝa emo li post la studjaroj komencis produktadon en multaj diversaj formoj: de poemoj, vojaĝpriskriboj, romanoj kaj teatraĵoj. En la tea-

tro, kiu posedis lian amon, li havis nur malmulte da sukceso, tamen estis akceptita la dramo *Mulatten* (la mulato 1840), la opero-teksto de *Liden Kirsten* (eta Kirsten 1846) kaj la komedio *Den ny Barselstue* (la nova akuŝejo 1844). Vojaĝi kaj vidi fremdajn landojn estis por li, dum la tuta vivo, la plej granda ĝojo kaj inspiro, lia unua prozaĵo estia fantaziplena priskribo de *Fodrejsen fra Kobenhavn til Ostpynten af Amager* (Piedvojaĝo de Kopenhago ĝis la orienta marbordo de Amager 1820), poste sekvis la de Heine-inspirata *Shyggebilleder* (ombraj bildoj 1831) priskribo de vojaĝo al Harzen, kaj en postaj jaroj li daŭre entreprenis novajn vojaĝojn, precipe al suda Eŭropo. Longa vojaĝo tra Germanujo — Italujo — Grekujo — Turkujo kaj hejmen laŭ Danubo kaŭzis la brilan priskribon *En Digters Bazar* (Bazaro de poeto 1842). Poste venis la vojaĝpriskriboj *En Svedujo* (1851) kaj *En Hispanujo* (1863). Ĉi tiuj vojaĝlibroj elradias liajn specialajn observpovon kaj vojaĝĝojon, lian senton por la poezio de la realeco kaj de ĉiutago, kaj inter alie ili montras al ni, kiel li meze en la romantika tempo ĝojis pri la teknika evoluo kaj sentis ĝian enroman eblecon. Li povis fantazii pri la flugmaŝino kaj pri fenomenoj similaj al la radio.

Pli konata li fariĝis pro siaj romanoj. Post sia raveco pri la travivaĵoj de la kolorriĉa popolvivo en Italujo li ekverkis ĉi tiujn romanojn: *Improvisatoren* (la improvizanto 1835), kiu rapide fariĝis vera sukceso, tradukita kaj konata en eksterlando. Poste sekvis O. T. (1836) kaj *Kun en Spillemand* (nur muzikisto 1837). Komunaj por tiuj tri romanoj estas la fortaj elementoj da membiografio kaj memtravivaĵoj, impresoj de liaj infaneco kaj juneco, la mizero kaj la suferoj de la malriĉa artisto, enkadrita de pitoreskaj kaj veremaj rakontoj similaj al la vojaĝpriskriboj. En *De to Baronesser* (la du baroninoj 1848) malaperis la subjektiva elemento, dum la substreko de la socia nejusteco estas pligrandigita. Ambaŭ du heroinoj de la libro montriĝas esti naskitaj en la plej malaltaj rondoj de la socio. La lastaj romanoj estas *At voere eller ikke voere* (Ĉu esti aŭ ne esti 1857), kiu temas

pri la lukto inter kredo kaj scio, kaj *Lyk-ke-Peer* (bonŝansulo 1870) Ĉiuj la supre cititaj verkoj estus povintaj havigi al H. C. Andersen grandan reputacion en lia tempo, sed la mondfamon kaj posttempan amon kaŭzis kompreneble *La fabeloj*. La unua kajero kun la fabeloj (Fajrilo, Malgranda Niko kaj granda Niko, Reĝidino sur pizo, Floroj de la malgranda Ida) aperis 1835, en la sama jaro kiel "la improvizanto" kaj antaŭ la fino de la jaro ankoraŭ unu kajero (enhavante inter alie Elinjo Fingreto kaj Vojkamarado). Tria kajero (enhavante inter alie: La virineto de maro kaj La novaj vestoj de la reĝo) aperis 1837. Estis malgrandaj modestaj kajeroj, kiuj ne vekis tro da intereso, sed la saĝa H. C. Orsted jam tiam diris: la romanoj famigis Andersen, sed la fabeloj faros lin senmorta. La verkisto mem apenaŭ komprenis, ke jen li trovis sian veran esprimformon, tiun stilon, kiu kunigis ĉiujn liajn fortojn en unu tuto, sed la akcepto de la fabeloj ĉirkaŭe en la fondo verŝajne iom post iom montris tion al li. Li daŭrigis ĝis siaj lastaj jaroj, kun paŭzo de tempo al tempo, aperigi novajn kolektaĵojn da fabeloj kaj historioj, ĉefe en serioj 1843-48, 1852-53 kaj 1857-72. Dum la unuaj kolektaĵoj nur estas "Fabeloj rakontitaj por infanoj" li poste en la daŭro de la jaroj agordigis kaj riĉigis la formon tia, ke la fabeloj ofte sin turnas kaj al infanoj kaj al plenkreskuloj. Jes, kelkfoje nur al plenkreskuloj. La historioj ofte kreskis ĝis longaj noveloj aŭ ĝis profundaj vivfilozofiaj simboloj.

Kiel infano H. C. Andersen estis fantazianta, improvizanta, rakontanta naturalento. Dum sia juneco li uzis sian genian rakontpovon por la infanoj de tiuj kopenhagaj familioj, kiuj lin gastigis. Li fariĝis verkisto en la romantika tempo, kiam oni entuziasmiĝis pri popolfabeloj kaj fantazia verkado, kaj kiam precipe germanaj, sed ankaŭ danaj verkistoj denove vivigis tiujn formojn. Estas kompreneble, ke Andersen devis uzi la fabelan formon, kaj ke li superu ĉiujn siajn kunulojn. Kial? Kio estas la sekreto de la forto de liaj fabeloj? Mi opinias, ke oni povas montri al du ĉefkaŭzoj. Unue la magia kaj

mirakla mondo de la fabeloj estis por H. C. Andersen kaj lia infanmedio io natura kaj vera, io, en kio kreskadis kaj kun kio li vivis. Li ne bezonis, kiel devis liajn germanaj antaŭuloj Tieck kaj E. T. A. Hoffmann kaj Chamisso, imiti malnovan formon, ne *surpreni* sur sin rolon de naiva rakontanto, kaj senpera infaneca naturo. Li *estis tia*. Tial oni sentas liajn fantaziaĵojn, lian ludon kun la objektoj, liajn inspirojn de floroj, insektoj, pilkoj kaj stansoldatoj kiel konvinkigan artistan veron.

Due, lia propra vivo formis sin kiel pruvo je la enhavo de la popolfabeloj: la revo de la ordinaraj homoj pri sukceso, la privenko de ĉiuj malfacilaĵoj kaj altrangaj konkurantoj de la malriĉa knabo, la optimisma kredo je la plej interna justeco de la estado, la kredo, ke natureco kaj sana prudento privenkos riĉecon, snobecon, hipokritecon kaj maljustecon. Liaj propraj spertoj, liaj venkoj same kiel liaj humilaĵoj, eniras kiel vivanta ŝtofo en la plej multajn de la fabeloj. Do ankaŭ ĉi tie vero anstataŭ imitaĵo. Krome la fabela formo donis al li eblecon, pere de bildlingvo kaj ruza simboliko esprimi tion, kion li ne povis permesi al si elparoli rekte: Li povis esprimi siajn suferojn kaj sian fieron (la malhela anasido), sed ankaŭ ironii pri siaj propraj malfortoj; li povis rakonti pri sia malfeliĉa patrino (Ĝi estis tute sentaŭga), montri sian simpatian por la malfeliĉuloj en la socio (Ĉio sur sian ĝustan lokon) kaj ataki la entuziasmon pro la malnova tempo (Galoŝoj de feliĉo), kaj li povis ataki siajn kontraŭulojn, venĝi por nejusteco kaj humiliĝo kaj inciteti la kritikantojn. Li estis majstro pri la laste nomita. Multaj moketoj kaj malicaĵoj sin kaŝas en la naiveco de la fabeloj. Ni bone konas liajn vivon kaj pensojn. Li skribis taglibron, skribis amasojn da leteroj, kaj plurfoje li donis sian membiografion.

28-jara li verkis sian unuan, "Lewnedsbogen" (vivpriskribon — nur eldonita en 1926), sed ĉefa verko estas *Mit Livs Eventyr* (la fabelo de mia vivo 1855), la preciza rakonto pri lia malfacila vojo al la famo. En tiu ĉi jaro li jam atingis la grandan reputacion, fariĝis konata ekster

LA VIII ARGENTINA ESPERANTO-KONGRESO

Luis de Azeredo Coutinho.

Ekkoni Argentinon estis iu mia antikva deziro. Ĝi tamen pli kreskis ekde la feliĉa momento, kiam, en Curitiba, okaze de la XIV-a Brazila Kongreso, mi kunfratiĝis kun la juna, klera kaj simpatia najbara karavano, gvidata de samideano Kohei.

Mi ne scias, kiu ei ili estis la plej afabla kaj ĝentila. Mi nur scias, ke mi restis tute kaptita de iliaj frateco kaj samideaneco.

Tial, mi promesis al mi mem fari ĉion eblan por partopreni ilian VIII-an Kongreson.

Kaj... de tiu tago, kvazaŭ lernanto sopirante sian ferion, mi, kun la koro premata, atendis la alveturan tagon.

la limoj de Eŭropo, kaj lia famo kreskis de jaro al jaro. Lia vanteco estis kontentigata pro tiuj admiro kaj honorigo, kiujn oni montris al li, tamen pli multe en eksterlando ol en lia naskiĝlando.

En Danujo li prefere restadis en la grandbienoj, en la plej altrangaj rondoj, kaj li estis ŝatata gasto ĉe la kortegoj kaj hejme kaj eksterlande. Li vivis el la varmo de la admiro kaj famo, ne povis vivi sen ĝi, ĉar li estis soleca homo, al kiu normala homa feliĉo ne estis destinita: la tragedian finon de juneca enamigo certe kaŭzis li mem, kaj lia tre priparolita amo al la sveda kantistino Jenny Lind ne estis reciproka. Ni povas dubi pri tio, sed li mem diris, ke li estas feliĉa kaj li dankis al Dio pro tio: "La historio de mia vivo instruos al la mondo, kion ĝi instruas al mi: ke ekzistas bona Dio, kiu gvidas ĉion plej bone".

Li mortis en Kopenhago la 4-an de aŭgusto 1875.

SVEN MOLLER KRISTENSEN.

Tradukis: *Gustav Kühlmann.*

Rim, La titoloj de la fabeloj devenas de la Zamenhofaj tradukoj.

Finfine, en malvarma kaj nebula aprila mateno, mi eniĝis en rapidegan Varig-an "Convair", kiu lasis la flughavenon Galeão je la oka.

Post tri horoj da bonega flugado, ni haltis ĉe Porto Alegre, kie oni ŝanĝis la aviadilon. Je la tria kaj kvarono vespere ni alteriĝis ĉe Ezeiza, la flughaveno de Buenos Aires.

Tiam unuafoje mi interrilatiĝis kun dogana oficisto: mi devis bedaŭri nur la malordigon de li faritan en miaj valizoj...

En la doganejo la konfuzo estis tre granda.

Ekstere estis malseke kaj malvarme.

Elirante el la aviadilo, mi tuj rekonis, ĉe la balustrado de la stacidomo, miajn karajn geamikojn Zulema Martin kaj Julio Kladniew, akompanatajn de iu simpatia blankhararaj sinjoro, tre gaja kaj habilema, kiun mi ne sukcesis identigi. Tamen, kiam mi alvenis ĉe ilin, mi sentis min kiel ĉe malnovaj konatoj. Lia nomo estas Āngelo Corral. Kian honoron faris al mi tiu ĉi triopo! Nur tiu, kiu jam havis la feliĉon ĝui ilian plezurigan kunestadon, povas ja kompreni mian dankemon.

Komforta omnibuso de la kompanio Varig, kies servado konkuras kun la plej bonaj pri tiu metio, kondukis nin al hotelo City, kie bonega ĉambro estis preparita por ni. Dum la veturado, kiom da demandoj kaj respondoj ni faris unuj al la aliaj, mia Dio! Siaflanke, la ceteraj vojaĝantoj per la okuloj sin demandis reciproke kiun lingvon ili aŭdadas...

Alveninte al la hotelo, mi lasis la valizojn, kaj mia unua zorgo estis serĉi la sidejojn de la kompanioj Pantour kaj Aerovias, por certigi pri la alveno de aliaj brazilaj gesamideanoj, kiuj nur lasthore povis decidi pri siaj vojaĝoj.

Senĉesa kaj teda pluveto malvarmigis la veteron, kaj la malseka malvarmo penetris nin ĝisoste. Bedaŭrinde, mi ne sukcesis en mia serĉado.

La veturo al Rosario estis difinita por la noktomezo, akurate. Mi iris do vespermanĝi, akompanata de Julio Kladieniew. Bonega rostaĵo! Dolĉegaj vinberoj! Varmiga bongusta vino!

Fininte la vespermanĝon, ni iris al la omnibusa stacidomo. Tie ni kuniĝis kun la gesamideanoj el Buenos Aires, Eva Perón, La Plata, ktp. "Tiam ni konatiĝis kun kelkaj gesamideanoj, kiuj ĝis la fino de la Kongreso, estis miaj plej bonaj kunuloj: gesinjoroj Clara kaj Jorge Hess, gesinjoroj Sonja kaj Kurt Milkuschutz, s-ino Bajugar, s-ro Vila, s-ro Villafranca. Ankaŭ tiam mi renkontiĝis kun miaj jam konataj Calógero, Martinez kaj aliaj. Poste, per la sama omnibuso, ni ĉiuj veturis al Rosario, kie ni alvenis je la oka matene.

Longa kaj daŭra vojaĝo. Kompreneble, ĉiuj kapbalancadis pro dormemo. Senfinaj rektaj vojoj sur bonega ŝoseo. Nur du-tri haltoj, por eniro kaj eliro de vojaĝantoj. La veturado fariĝis monotona. La malgrandajn haltojn ni profitis por trinki taseton da kafo.

Fine, Rosario!

Granda, bela, impona urbo, banata de la rivero Paraná, kiu, elfluante el Brazilo, alportadas siain akvojn al la sudaj respublikoj. kvazaŭ konstanta mesaĝo de riĉeco, unueco kaj amikeco.

Tuj kiam ni eniris la urbon, ni ekvidis sur la muroj grandajn afiŝojn pri la Kongreso. Pro siaj koloroj, ĉefe verda kaj blanka, ili atentigis la preterpasantojn kaj donis belan aspekton al la lokoj, kie ili estis algluitaj.

Rosario posedas pli ol unu esperantista societo. Tie loĝas niaj karegaj Margarita Alcantara, silentema, diligenta kaj laborema; kaj la prudenta kaj frankvila Kohei, kun kiuj mi jam konatiĝis en Brazilo. Al ĉi tiu grupo ni aldonu: Hugo Lingua, alnomata de liaj samlaboruloj mem "ĉampiono de la laboro"; s-ro Petro Martin, energia, ĉie estanta, ĉiam juna, ĉu pro lia agemeco, ĉu pro lia gajeco, superregataj de sensimila honkoreco;

s-ino Paquita, lia filino kaj helpantino en la poresperanta laboro. Krom tiuj, multaj aliaj lertaj kaj laboremaj gesamideanoj, kies memoron mi avare gardas en mia koro, konsistigas la viglan rondon de niaj kunbatalantoj en Rosario.

Specialan eminentan lokon okupas samideano Prof-ro Hiram Calógero, la Dekano de la esperantismo en Argentino, kiu honorigis per sia ĉeesto ĉiujn kunsidojn.

Simpatia, moviĝema, gaja centoj da gesamideanoj atendis la omnibuson. Salutoj, prezentadoj, karmemoraj ĉirkaŭprenoj, feliĉaj bondeziroj... tia estis la brukriado, kiun oni povis aŭdi kaj vidi. Ekirante al la hotelo, mi renkontis la gesamideanojn Margarita kaj Kohei, Roberto Otermi, de Bahía Blanca, kaj aliajn. Kia feliĉo, revidi ilin!

Mi tiam sopiris ripozi. Efektive, la vojaĝo, kvankam komforta, lacigis min kaj iomete rigidigis miajn membrojn. Krom tio, konstanta pluvetado dum la tuta tago alportis al ni nekutimigitaj al tia vetero, netolereblan kaj malsekan malvarmon, kiu ĝisoste penetris min.

La solena malferma kunsido okazis la 7-an de Aprilo, en la salono "Manuel Belgrano", de la Federación Gremial del Comercio e Industria.

Neatendita pluvegado tre malhelpis la iradon de la kongresanoj tra la urbo, tamen ĝi ne sukcesis perturbi nian feston.

Krom la esperantista familio, konsiderinda kaj multnombra publiko ĉeestis la malferman kunsidon, plenigante la tutan salanon.

Antaŭ la kunsido ni vizitis esperantan ekspozicion, aranĝitan en apuda salono.

Jus enirintaj en la salanon, ni aŭdis "La Esperon" kaj "Bonvenon", sonorvoĉe kantatajn de la "Coro Mixto Rosario".

(Daŭrigas en la sekvanta numero)

**KONSTANTE PORTU LA VERDAN
STELON!**



LA MISTERO

ROMANO

**Afrânio Peixoto, Coelho Neto,
Hedeiros e Albuquerque,
Viriato Correia**

XIV

LA KAPO DE PETRO

Post tiu longa revado, en kiu la realaj reprezentadoj kuniĝis al la imagoj de lia fantazio, pro tre ordinara fenomeno de falsado, por kiu ni alfaras la okazintaĵojn —, Petro Albergaria profunde spiris, frapis la frunton per la mano kaj ekkriis:

— Atentu, ke mi ne iĝu freneza pro tiuj mensogoj de la ĵurnaloj, pro tio, kio fakte okazis, pro tio, kio nun sin rearanĝas en mia kapo!

Kvazaŭ por certigi pri sia dubo, li resumis kelkajn epizodojn, penante enfokusigi la atenton, rememori la verecajn impresojn, por ne perfidi sin per la parazitaj elementoj de la emocio aŭ de la intereso, kapablaj ŝanĝi la realaĵon al nura romano. Sed, eĉ kun peno, en la agitata menso ne aperis kun la dezirinda klareco la alvokitaj impresoj.

— Estas strange, kiel eĉ detaloj absolute materiaj, kiujn mi ne devus forgesi, nun konfuziĝas en mia memoro... Ekzemple: kiam mi preparis min por la krimo, volante eviti, ke la fingraj signoj povus resti sur la tuŝitaj objektoj, mi elektis tre malnovajn kotonajn gantojn kaj vestis per ili la manojn... Tamen sur la marbordo Botafogo, mi bone memoras, mi ĵetis en la maron kaŭĉukajn gantojn... Kiel ekpliki tion? La du impresoj tute ĉeestas, kaj estas klaraj kaj tamen malakordaj... La lakitajn ŝuojn, kiujn mi ĵetis en la akvon, mi estas vidanta, se tio estas ebla, mi estas vidanta... tamen hejme mi estis vestinta tenisajn botetojn kun kaŭĉuka plando, pri kiuj mi memoras kun plena certeco. Ĉu mi estas eble freneza?

Li pasigis la manon tra la malseka frunto, sin palpis tute, kvazaŭ por provi sian sentokapablon, faris al si mem kelkajn pinĉojn, faris kelkajn paŝojn, parolis laŭte, rigardis al la strato, kaj ŝajnis certigi, ke li estas tute sana, kaj, li kredis, en perfekta saĝo.

Tamen li daŭrigis la remaĉadon de la malakordoj en sia memoro.

— Ĉu mi pendigis aŭ sufokis lin? Evidente mi pendigis, ne pendigo per la manoj, kio ne povis esti, sed per ŝnurmaŝo; tamen mi memoras ankaŭ, ke mi ŝtopis al li la nazon kaj la buŝon. Sed tio nur kompletigis, cetere senutile, la asfiksion, ĉar la viktimo ne reagis, kio okazus al la nura sufoko per la manoj kontraŭmetitaj al la buŝo kaj al la nazo. Nu, la ĵurnalo diras, ke la ekspertiza kuracisto ne trovis signojn de lukto sur la korpo, kaj de tio oni deduktas, ke la faro de miaj manoj ĉe la spiraj ekstremaĵoj ja havis neniun efikon. Pendigo jes, estas nenia dubo, kaj rimarku, ke tiu D-ro Teopompo Vasconcelos ne estas tia azeno, kian oni dissciigas.

Kaj la letereto? Pri tio la menso de Albergaria atingis la apogeon de la embaraso. Li estis ŝanĝinta la veston, estis portinta nenion kun si, tamen estis nediskuteble — por kio ĝin nei al si mem? —, la letereto estis tiu, kiun Rozinjo skribis al li en la antaŭtago, kiam ŝi komprenis, ke li ŝanceliĝas en sia plano de venĝo. Estis nenia dubo, ke temas pri ŝi, pri lia amatino, Rosa, ĝuste Rosa, kaj pri li, Petro, verege Petro, Petro Albergaria. Sed tiu letereto estis domaĝa; kiom ajn li volus tion nei al si mem, li ne povus ĝin malakcepti, nek modifi, kiel li ŝanĝis la specojn de la gantoj kaj de la ŝuoj. Atentu, ke Majoro Bandeira per sia lanterno havis grandan sukceson! Tiu malbenita letereto estas la sola postsigno, per kiu oni povas persekuti min... Nu, sinjoro Petro. — li konkludis en si mem, — tiom da planoj, tiom da zorgoj, kaj sin malkovri tiel, kiel idioto, ĉe la lanterno de la Majoro!

Li restis unu momenton antaŭtimema, sed poste, kvazaŭ fidanta al la lerta tromp-

kaŝo, kiun li antaŭdecidis, li finis la prienson:

— Ankaŭ ni ne troigu... per unu Rosa kaj per unu Petro ili ne atingos multon, se ili havos nur tion. Ni ne estas la solaj posedantoj de tiuj nomoj. Ekzistas miloj da Petroj...

Tiam li memoris pri Rosa, kunigita en la memoro al tiu okazaĵo, kaj pensis:

— Malgraŭ mia patrino, malgraŭ mia longdaŭra kaj konservita malamo, eble sen ŝi, sen tiu diabla Rosa... mi ne kuraĝus plenumi la krimon...

Nun li preskaŭ kulpigis ŝin pri ĉio. Li ridis pro tiu ekŝanĝiĝo de siaj sentoj; kaj pro la kutimo de analizo, kiu ne lasis lin, li komencis demandi en si mem pri la kialoj de tiu ŝanĝiĝo.

Ĉu estas eble, ke oni ŝanĝiĝas tiel rapide, aŭ ke oni sin lasas tiel facile impresi? Depost hieraŭ ne forlasas min kaj min persekutas tiu ĉarma malgranda figuro de virino, envolvita en vira masko-vesto, kiu ne kaŝis ŝin, sed male ŝin montris pli bone. Kia bela vizaĝo! Kiel la blondaj haroj bone akordigis al la bruna haŭto! En la unua ekmovo de simpatio li eĉ suferis kun ŝi pro tio, ke oni portis ŝin per la polica omnibuso kaj ne per luaŭtomobilo, per deca taksio, kiel ŝi vere meritis. Kiam ĉe la akcidento de la servistino de Sanches, ŝi komencis plori, konvulsie... Atentu, Petro, ĉu ŝi estis trankvila, indifera, kiel mi ĵus imagis, aŭ ŝi ploris supermezure? Mi ne scias. Jes, ŝi ploris, kaj tiom, ke tio ŝiris al mi la koron, kaj tuj mia priokupiĝo estis savi ŝin kaj faciligi ŝian liberiĝon, kion mi sukcesis... Mi ja volus, ke tiuj friponoj, ŝiaj du kunuloj, Julio kaj la alia, tiu, kiu glátigis al ŝi la harojn, povus resti enkarcerigitaj!

Li haltis unu momenton, faris longajn paŝojn kaj religis la fadenon de la penso:

— Nu, sinjoro Petro, konfesu, tio estas pli nobla, konfesu, ke la alivestita junulino lasis al vi tre fortan impreson. Ĉu tiu fakto estas tio, kion la aŭtoroj (mi pensas, ke Stendhal) nomas *coup de foudre*, tio, kion la Akademiano Salgado ŝanĝis al *fou de coudre* en sia lasta romano?

Li ridis pro sia propra gajeco kaj finis laŭte sian monologon.

— Vi ridas, tio estas la duono; se fine vi ploras, tio estas la resto. Vi estas amanta, vi estas alnajlita, mia amiko. Sainte-Beuve diradis al George Sand, kiu konsultis lin pri signoj de amo: *Vous pleurez! alors, vous aimez!* La vero estas, ke oni komencas ridanta. Vi jam estas ĝoja, S-ro Petro... Aŭ plibone vi estas freneza!

Li haltis denove kaj redemandis laŭ la sama malnova kaj kruda procedo, ĉu lia saĝo estas sana. Ĉe la konfirmo li rekvietiĝis kaj daŭrigis sian psikologian analizon.

— Kaj Rosa? Ŝi estas preskaŭ indifera al mi, se mi ne atribuas al ŝi la kulpon ĉe la krimo. Ŝi donis almenaŭ la lastan impulson al ĝi. Eble mi malestimas ŝin pro tio. La fakto estas, ke antaŭ nelonge mi interŝanĝis la nomon de la alivestita junulino, kiun mi ankoraŭ ne scias, anstataŭ tiun de la alia, kvazaŭ temis pri ganto aŭ ŝuo... Sinjoro Petro, sinjoro Petro, tio ne marŝas bone... Kiam oni eniĝas en aferon, oni devas bone atenti al ĉio por ne intermiksi la faktojn...

Malgraŭ la kompleza konkludo de tiu juĝo ĉe la penso pri la alivestita junulino, Petro Albergaria post sia anomalia ekridigo iĝis severa kaj malĝoja.

— Kio okazis al ŝi? Kiel mi revidos ŝin?

Li preskaŭ deziris, ke ŝi ekaperu en la proceso eĉ okaze, ĉar la ĵurnaloj priparolus, kaj li tiam povus scii, kiu ŝi estas, scii ĉion, ĉion ceteran, kiu nun estis por li esenca. Ne ligante al tiuj pensoj aliajn, kiuj klarigus lian decidon, li prenis la ĉapelon, malfermis la pordon kaj eliris al la strato kun firma impulso.

— Ne estus eble, ke mi restu tiel, sciante nenion. Sur la ĵurnaloj estis malmultaj la informoj, tiuj, kiuj nun estis necesaj al li. Versajne li ilin ricevos.

Kaj ne atentante al tio, kion li faras, decide, kun nedifinebla celo, kvazaŭ li ludus je la vivo kaj la morto, li sin direktis al la marbordo Botafogo, ĉe la fino, serĉante la numeron 522.

Li rigardis malprecize al la domo, antaŭ kiu li haltis, kaj decide eniris kaj supreniris la ŝtuparon. Li ŝoviĝis tra la koridoroj, kiujn li malprecize rekonis, mik-

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

O trecho desta nossa secção é, no presente número, do grande poeta Augusto de Lima. Recordamos, com satisfação, que o conspícuo membro da Academia Brasileira de Letras sempre se mostrou favorável ao Esperanto. Assinou, com mais de 200 personalidades brasileiras a mensagem que a nossa Liga dirigiu, em 1921, à Liga das Nações, e pronunciou, na Câmara dos Deputados, em 1922, um belo discurso de encaminhamento do projeto do

sita kun la popolamaso, kiu eniris kaj eliris, kaj li venis tiel ĝis la pordo, kiu donis vidon sur unu ĉambron, kie okazis io eksterordinara.

Policistoj kaj skriboficistoj malhelpis la eniron, kun la koloj etenditaj, kun la okuloj kaj la oreloj atentaj. Petro sukcesis leviĝi sur la piedpintoj kaj rigardis...

— Mia Dio... ĝi estas ŝi! Ŝi denove ĉi tie!

Krio de mirego estis tuj elironta el lia gorgo, sed li sin regis, aŭ la aliaj ne atentis.

Kiel ŝi aspektis bela en sia severa nigra vesto, nun vestita kiel virino, kaj virino eleganta, kvankam en tuta simpleco, kaj pro tio pli ĉarma! Antaŭ ŝi Lobato, kiu demandis ŝin, kaj du aliaj, kiuj probable estis Bandeira kaj Cabral, pri kiuj parolis la ĵurnaloj. La kompatindulino preskaŭ ne povis sidi, agitata de konvulsiaj plorsingultoj, senĉese ploranta. Larmoj pleniĝis tiam la okulojn de Petro, en nekontraŭstarebla emocio.

Li ne povis sin regi, forpuŝis la ĉirkaŭantajn barojn, faris unu paŝon antaŭen, kriis kun furiozega voĉo:

— Tio estas maljusta, tio estas maljusta! Ĉu vi ne vidas, ke ŝi estas senkulpa?!

AFRÂNIO PEIXOTO. Tradukis K.

Deputado José Augusto, que estabelecia o exame de Esperanto no curso de preparatórios, então vigente.

Eis o trecho, de que daremos a tradução no próximo número para a comparação:

O RISO E A LAGRIMA

Todos podem chorar, e nada é tão vulgar como a lágrima, que é o derivativo da dor, partilha dos seres animados; mas só podem rir os indivíduos que progredem para um grau superior.

As lágrimas correm tôdas ao estuário da morte, extremo conforto, mas também horror dos fracos. O riso, não! Superpondo-se à derrocada do organismo, zomba serenamente da morte, encarando-a como um simples acidente, ou riso místico nos lábios dos mártires cristãos, ou riso estóico na face pálida dos que acreditam na supervivência da virtude, ou riso filosófico, apenas denunciado no olhar dos que consideram a vida como um elo ou transição na cadeia das transformações terrestres. E' que êle anestesia todos os sofrimentos.

O riso partilhou, nos séculos do maior despotismo, o cetro da realeza, quando os bobos da côrte esmagavam a fidalguia insolente, tendo o supremo privilégio, vedado à própria coroa, das indiscrições, que devassam, e dos sarcasmos, que fulminam.

Augusto de Lima

Reiteramos aos nossos leitores o pedido de sugestões para trechos destinados à secção.



Brazila Kroniko

PERNAMBUCO

Recife — Nia samideano Calinício Silveira daŭrigas, en la dimanĉa eldono de *Diário de Pernambuco*, sian interesan Esperantan Sekcion *Língua bem viva*. Ankaŭ *A Verdade* (La Vero) presigas en ĉiu numero la legindan artikolon *Esperantismo*, de nia samideano Edgard Guerra.

SÃO PAULO

São Paulo — Inter-Amikoj Esperanta Klubo elektis sian novan estraron: Prez. Carlos Bevilacqua; Vicprez. Prof. Gladys F. B. Trama; 1.^a Sek. Sérgio Zacchia; 2.^a Sek. Antônio Pizzo; 1.^a Kas. Vinicius B. Sales; 2.^a Kas. Eduvaldo Campos; Bibl. Ariovaldo G. Abreu.

PARANÁ

Curitiba — Sub la gvido de Paraná Esperanto-Asocio funkcias, en salonoj de la Publika Biblioteko de Paraná, elementaj E'kursoj. Enskribiĝis 120 lernantoj.

Curitiba posedas ankaŭ sian straton *Zamenhof*, kies inaŭguro okazis dum la XIV-a Kongreso de Esperanto.

La nuna adreso de P. E. A. estas: Rua Riachuelo, 285, poŝtkesto 1701.

RIO GRANDE DO SUL

Porto Alegre — Solenante la 10-jaran datrevenon de la fondiĝo de la Esperantista Societo de Porto Alegre, okazis vesperfesto, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 80 gesamideanoj kaj simpatiantoj de Esperanto. En la sidejo de E. S. P. A. oni inaŭguris la portreton de la sindonema samideano D-ro Mário Cini, kiu forpasis antaŭ unu jaro.

Passo Fundo — Prof. Virgílio Josué Balestro profitas siajn profesiajn vojaĝetojn kaj feriajn ekskursojn por propagandi nian lingvon. En São Gabriel, Jaraguá do Sul k. a. nia samideano altiras amikojn kaj kolegojn al nia afero.

Pelotas — La estraro de la Esperanta Societo de Pelotas, elektita en Aprilo 1954 kaj reelektita en Marto 1955, aktive laboras por la movado. Ĝi konsistas el du estraranoj: S-ro Gilbert René Ledon, prezidanto, kaj S-ino Similde Schenk Ledon, sekretariino.

Oni faras kursojn, elementajn kaj mezgradajn, pligrandigas la libron, organizas ĉiusemajnajn kunvenojn en la sidejo de E. S. P. (ĉe la Ruĝa Kruco). Estas afiŝitaj flugfolioj en vizitataj lokoj kaj oni publikigas propagandajn informojn kaj artikolojn en la lokaj gazetoj. Oni aranĝas projekcion de propagandaj kliŝoj en loka kinujo. La 24-an de Februaro nia samideano Boris Eston parolis pri la skribado *Intersteno*. Je la 30-a de Marto okazis spektaklo titolita *El la Parizaj*

Vojoj, konsistanta el 20 poezioj verkitaj de Ges-roj Ledon, kiuj ilin deklamis.

RIO DE JANEIRO (D. F.)

Nia samideano Othon B. Baena sciigis, ke la grava muzikdiskfabriko Copacabana ĵus eldonis muzikdiskon kun la kanzono *Coimbra*, Esperanten tradukita de S-ro Baena sub la titolo *Nigraj Manteloj*, kaj kantita de la brazila kantistino Dolores Duran.

— Brazila Klubo Esperanto malfermis en sia sidejo, Praça da República, 54, I, en la 12-a de Februaro novan elementan kurson. Ĝin gvidas nia sindona samideano S-ro Aylton de Lima Rocha. Enskribiĝis 30 lernantoj. La lecionoj okazas ĉiusabate de la 16-a ĝis la 17-a horo kaj estos proksimume 20.

— En la samaj tago kaj loko Brazila Esperanto-Ligo inaŭguris konversacian kurson, kiu funkcias ankaŭ sabate, de la 15-a ĝis la 16-a horo. Instruas D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de B.E.L.

— La ŝatata programo «Renkontiĝo de amikoj» ĉe la Televido Tupi estis dediĉita al Esperanto en la 4-a de Aprilo. La direktorino de la programo, S-ino Lídia Matos, lerte intervjuis niajn samideanojn D-ro Miguel Timponi, Prezidanto de Brazila Klubo Esperanto, kaj D-ro Mário Ritter Nunes, 1-a Sekretario de B.E.L., kiuj traŝe respondis interesajn demandojn. F-ino Marlise de Sousa Nunes bele deklamis la Esperantan tradukon de la soneto «Aŭdi stelojn», de Bilac Multaj aŭskultintoj esprimis la deziron lerni Esperanton, kaj tial estos malfermita nova kurso en la sidejo de B.E.L.

III-a ESPERANTISTA EUKARISTIA MONDKUNVENO

DETLA PROGRAMO DE STUDKUNSIDOJ

18 de Julio: je la 10-12 horoj: Unua Kunsido

1) La Eklezio estas la Eŭkaristia Regno de Kristo

Referato de Pastro Ludwig Thalmaier (Germanujo).

2) La Gravaj eraroj modernaj, teoriaj kaj praktikaj en opozicio kontraŭ la Eklezio kiel Regno Eŭkaristia de Kristo.

Referato de Pastro Gabriel Pausback O. Carm. (Usono)

3) La intensiva vivo Eŭkaristia, rimedo por multigi la sacerdotajn alvokojn.

Referato de Pastro H.G. Wannemakers S. J. (Nederlando)

4) Esperanto kaj Katolikismo
Prelego de Dro Mário Ritter Nunes (Niteroi, Brazilo).

19 de Julio: je la 10-12 horoj: Dua Kunsido

1) Devo kaj rajtoj de la individuo kiel civitano en la eŭkaristia Regno de Kristo.

Referato de Pastro Kanoniko Isaias Lagares (Brazilo)

2) Eraroj nuntempaj, teoriaj kaj praktikaj, en siaj rebatoj sur la individuo kiel civitano de la Eŭkaristia Regno de Kristo.

Referato: de Pastro Jean Vernoux SCJ (Francujo)

3) Eŭkaristio — nutraĵo kaj kuracilo de la homo kiel civitano en sia Regno:

Referato de Lia Episkopa Moŝto Mons. José André Coimbra (Brazilo).

4) Esperanto al servo de nia Sankta Religio:

Parolado de Profeso Pedro Real (Kolegio «Tulio de França», União da Vitoria, Paraná, Brazilo).

5) Katolika Esperanto-Movado en la mondo.

Prelego de Dro Wilhelmo Solzbacher (Washington, D.C., Usono)

22 de Julio: je la 10-12 horoj: Tria Kunsido

1) La pozicio kaj misio de la kristana familio, kiel societo en la Eŭkaristia Regno de Kristo.

Referato de Pastro Profeso Modesto Carolfi, OFM (Italujo).

2) Aktualaj eraroj, teoriaj kaj praktikaj, koncernantaj la familion, kaj iliaj rebatoj sur ĝia pozicio kaj misio en la Eŭkaristia Regno de Kristo.

Referato de Frato Bertino Goerner O.S.F., Profeso de Kolegio São José, Porto de União, S. Catarina (Brazilo).

3) Eŭkaristio — ligilo de amo, de pieco kaj de ĉiuspecaj virtoj inter la membroj de la kristana familio.

Referato de Pastro J.B. Kao O.F.M.

4) Kiel ni povas disvastigi Esperanton en la katolikaj rondoj, precipe inter la Katolikaj virinoj.

Prelego de F-ino Lourdinha Galvão Cordeiro, (Recife, Brazilo)

5) Kiel ni povas disvastigi Esperanton inter la katolikoj en Brazilo?

Prelego de Sro Giovanni Faraco (Florianopolis, Brazilo).

23 de Julio: je la 10-12 horoj. Kvara Kunsido

1) La Socio en sia koncepto kaj en ĉiuspecaj funkcioj en la Eŭkaristia Regno de Kristo.

2) Eŭkaristio — fonto de ĉiu bono socia, homa, universala, nacia kaj individua en sia Regno.

Referato de Pastro Antonio Borges S. J. (Fortaleza, Brazilo).

3) Kiel ni povas uzi Esperanton por la utilo de nia Religio?

Parolado de Dro Luis Azeredo Coutinho (Belo Horizonte, Brazilo).

4) Ĉu ni bezonas Katolikan Esperantistan Unuiĝon por plifacile disvastigi Esperanton inter la Katolikoj?

Parolado de Profeso Eŭclides da Silva Carneiro (Brazilo).

Konkludo kaj rezolucioj.

LEI N. 2.892, DE 23 DE DEZEMBRO DE 1954

— Declara de utilidade pública o "Interfrata Esperanta Klubo" (Clube Esperantista "Fraternidade"), com sede nesta Capital:

Lucas Nogueira Garcês, Governador do Estado de São Paulo, usando das atribuições que lhe são conferidas por lei,

Faço saber que a Assembléia Legislativa decreta e eu promulgo a seguinte lei:

Artigo 1.º — E' declarado de utilidade pública o "Interfrata Esperanta Klubo" (Clube Esperantista "Fraternidade"), com sede nesta Capital.

Artigo 2.º — Esta lei entrará em vigor na data de sua publicação.

Palácio do Governó do Estado de São Paulo, aos 23 de Dezembro de 1954.

LUCAS NOGUEIRA GARCÉS
Edgard Baptista Pereira

Publicada na Diretoria Geral da Secretaria de Estado dos Negócios do Governó, aos 24 de Dezembro de 1954.

CARLOS DE ALBUQUERQUE SEIFFARTH
Diretor Geral-Substituto

(*Diário Oficial do Estado de São Paulo*, 25-12-1954).